

PAMORAME

Ĉina Radio Internacia

12/25
2015

Kantante sub la pluvo
—Amikeco pere de napolaj kanzonoj en la 100a UK

40 jaroj de Ĉinio kaj EU
Teo kaj Amo

Esperanto service, CRI-36 China Radio International P.O. Box 4216 Beijing, China 100040 电话 TELEFONOJ +8610 68891916 +8610 68891795 传真 FAKSO +8610 68891164 电子邮件 EMAILO espradio@cri.com.cn 网址 RETA ADRESO http://esperanto.cri.cn
总编 ĈEFREDAKTORO Wang Fang 王芳
执行主编 PLENUMANTO Ma Jinglin 冯璟琳
文字润色 LINGVA POLURADO Yu Jianchao 于建超
编辑记者 REDAKTOROJ / RAPORTISTOJ Xiong Linping 熊林平 Yu Jianchao 于建超 Zhang Ping 张平 Li Lu 李璐
平面设计 DESEGNISTO Liu Yuntian 刘云天
印刷单位 PRESEJO 天宇星印刷厂
合作单位 KUNLABORANTO EPĈ 中国报道 ĈEL 中华全国世界语协会
Kopirajto de Ĉina Radio Internacia 中国国际广播电台版权所有

OPINIOJ KAJ INTERVJUOJ

- 02Defioj post 100 kongresoj
—Intervjuo kun Mark Fettes, prezidanto de UEA
- 06Stabileco kaj kontinueco estas gravaj aspektoj
—Intervjuo kun Veronika Poór, nova ĝenerala direktoro de UEA
- 08Kantante sub la pluvo
—Amikeco pere de napolaj kanzonoj en la 100a UK
Alessandra Madella

INTERNACIE

- 10100-a UK, Lillo, 2015
- 1440 jaroj de Ĉinio kaj EU
Retrorigarde: Sorbi dinamismon el kreskanta Ĉinio

ESPERANTO KAJ NI

- 20Teo kaj Amo
- 28Duan Yongxing, duoble sukcesa

DISVOLVO KAJ MODO

- 30Malfermiĝis novaj fervojlinioj tra Azio kaj Eŭropo
- 31Transmara firmaokunigo rolas grave en transformiĝo kaj pligradiĝo

NUNA ĈINO

- 32La impulsoj estas malfacile priskribeblaj, sed gravas mem-esprimo—
intervjuo al sendependa dokumenta-filmisto Amiao
- 34Fervojo kvazaŭbusa en la delto de Jangzio
- 35Mondo, pli bela ol vi supozas
—rakonto pri vojaĝo de emeritaj geedzoj
- 36Vendejo de nuptaj kostumoj kiel antikvaj



向往

向往什么？我时常这样自问，有时间的自己也张目结舌。人间的欢乐和病痛在大地蒸腾，在心的天空凝聚成云，或飘洒甘霖，或倾斜雪暴。这甘甜和苦辛的水，被心灵之根吮吸，便生出一种欲望，和树木的根一样，伸展着枝干，伸出地面，伸向天空，去窥探一个泥土里不曾有过的世界，去追寻绿叶，追寻繁花，追寻蕴育着未来的秘密的果实。

这是向往的品性吗？——是。向往与生命同在。向往是生命的一种存在形式。我已屡屡尝受向往的甘辛，一任瓣瓣心花伴随向往的时序更迭，萌发——飘落，飘落——萌发。于是，我继续向往。

我知道，生命若没有向往，那是没有生命过的生命，等于死胎，早衰，或者枯萎，不管是树，还是人。

Sopiro

Kio estas sopiro? Tion mi ĉiam demandas interne kaj iutempe la demando lasis min konsternita kun larĝe malfermitaj okuloj. Ĝojo kaj peno leviĝas en la mondo kaj nubiĝas en la koro, en formo iam de pluveto, iam de torenta neĝo. La koro, absorbanta la dolĉan kaj afliktitan akvon, floradas en sopiron, kiu etendas sin al la tero kaj la ĉielo kiel arboradikoj, por alstrebi la alian mondon, tute malsaman ol tiu sub la tero, por alstrebi verdan folion, belan floron kaj sekretan frukton, kiu enhavas la estontecan ŝlosilon.

Ĉu tio estas sopiro? Jes. Sopiro ekzistas kun la vivo. Sopiro estas la alia formo de la vivo. Mi jam foje kaj refoje suferis plendojn de la sopirado, la floroj en mia koro burĝonis kaj velkiĝis, revelkiĝis kaj reburĝonis. Kaj mi, plue sopiras.

Mi scias, ke la vivo ne estas viva sen sopiro. Ĝi estas nur mortnaskita feto, antaŭtempa senileco aŭ velkeco, kaj la arbo, kaj la homo.

Defioj post 100 kongresoj

Intervjuo kun Mark Fettes, prezidanto de UEA

Dum la 100a UK en Lillo, E-Redakcio de Ĉina Radio Internacia faris intervjuon kun Mark Fettes, prezidanto de UEA. Temas pri la defioj de UEA, ĝiaj agadoj en eksteraj rilatoj, la nuna stato de la Esperanto-movado en Afriko kaj aliaj.



E-Redakcio: Jam pasis pli ol cent jaroj post la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Mar. Dum tiu longa tempodaŭro, kio estas la rolo ludita de UEA, kaj kiujn defiojn UEA alfrontis en la Esperanto-movado?

Mark Fettes: En la jaro 1905 UEA ankoraŭ ne ekzistis. Oni fondis ĝin tri jarojn poste, responde al la evoluo de la Esperanto-movado en tiu tempo. Tiam la ideo estis tre simpla: sekve de kreskado de la movado en la diversaj landoj, esperantistoj esperis krei internacian asocion, tute sendepende de la nacia nivelo. Tio estis tre sukcesa koncepto. En la komencaj du aŭ tri jaroj de post ĝia fondiĝo, UEA jam ekhavis 7000 individuajn membrojn tra la tuta mondo, kaj tiel disvolviĝis ĝiaj multaj aspektoj, ekzemple delegita reto, kiun ni nun konas.

En la 20aj kaj 30aj jaroj, UEA restis la plej granda kaj riĉa E-asocio, kaj tio kaŭzis streĉojn kun la naciaj societoj. Post longa evoluo kun pluraj interkonsentoj, fine oni decidis kombini ambaŭ flankojn, tiel ke nun ni havas nian modernan UEA, kiu havas ne nur individuajn membrojn, sed ankaŭ landajn asociojn jam en pli ol 75 landoj tra la mondo. Tio estas speco de kompromiso, sed eble necesas tia kompromiso por ke oni vere havu unu asocion, kiu reprezentas la tutan Esperanto-movadon.

La nuntempo iom similas al la komenco de la 20a jarcento. Pro interreto multaj homoj lernas Esperanton tute sendepende de la landaj asocioj aŭ lokaj kluboj, kiel per Duolingo, kiu aperis nur antaŭ kelkaj semajnoj kaj jam havas 60 000 lernantojn. Imagu, se nur dekono de tiuj lernantoj fariĝus membroj de UEA, ni jam duobligus nian membro-nombron. Do mi opinias, ke oni devas pripensi la agadon de UEA por la nuntempa mondo. Ĉar la internacia komunikado fariĝis tiel facila kaj tiel tuja,

multaj homoj ekuzas Esperanton, ne membriĝante al iu ajn asocio je loka nivelo aŭ landa nivelo. Homoj simple per Esperanto konatiĝas kun aliaj homoj. Kvankam tio kompreneble respondas al la origina celo de la lingvo, ni frontas la defion konvinki pli da tiaj homoj aliĝi al UEA. Tio certe estus bono al la asocio kaj ankaŭ estus bono por la movado, se tiuj homoj fariĝus ankaŭ aktivaj en diversaj asocioj, kongresoj, kaj simile.

E-Redakcio: En la parolado en la malferma ceremonio de la 100a UK, vi menciis, ke la kulturo de Esperanto similas al ŝipo, kiu navigas inter la havenoj de naciaj kulturoj. Ĉu tio signifas, ke la Esperanto-movado havas la eblecon renkonti tamen venton, aŭ ventegon, ne nur facilan venton?

Mark Fettes: UEA certe havas malfacilaĵojn pro tio, ke ni ne havas teritorion, kaj do nia ekonomia bazo ne estas simila al tiu de naciaj lingvoj. Estas evidente, ke ni ne povas imposti, kaj homoj ne havas teron, kiun ni povas konstrui kaj vendi. Ni vere vivas per la propraj rimedoj. Bonŝance, tamen, la nuntempa mondo estas sufiĉe akceptema kaj malferma pri fenomenoj kiel Esperanto. Ja multaj homoj dum sia vivo iras de lando al lando kiel maristoj; ili vere sentas sin ne tiel izolita en nur unu kulturo. Oni foje nomas la sperton de esperantistoj kiel kosmopolitismon, kaj nuntempe ankaŭ aliaj homoj havas tiun sperton. Tio akceptiĝas pli nature kaj pli simple ol antaŭe, kiam tio estis vere preskaŭ revolucia.

Malgraŭ tiaj evoluoj, tamen, oni ja vidas, ke la komencaj esperoj, kiujn Zamenhof esprimis en sia parolado en la unua kongreso, ne realiĝis tiel rapide kaj tiel komplete kiel li imagis. Mi pensas, ke la aktualeco de Esperanto restas la sama; la baza mesaĝo de nia movado havas tutan saman signifon kaj gravecon por la nuntempa mondo,

kiel antaŭ cent jaroj. Sed tio restas mesaĝo iusence minoritata, aŭ mesaĝo, kiun la homoj povas aŭskulti kaj akcepti, sed kiu ne konkretiĝas per transformo de la socioj al pli justa aranĝo, sur la kampoj de lingvo-instruado, lingvo-politiko kaj simile. Ŝanĝi la koncepton de homoj pri lingvo-egaleco kaj komunikado, aŭ pri mond-civitaneco kaj tiel plu, ankoraŭ estas granda defio.

E-Redakcio: En la inaŭguro de la 100a UK ni vidis, ke afrika esperantisto salutis, kaj ni scias, ke IJK eble okazos en Afriko. Ĉu tio signifas grandan progreson de la Esperanto-movado en Afriko?

Mark Fettes: Jes, vere. Se mi komparas la nunan situacion kun tiu kiun mi konis antaŭ 25 jaroj, kiam mi laboris en la CO de UEA kiel redaktoro de la revuo, okazis kompleta transformiĝo de la afrika agado. Tiam en la 80aj kaj 90aj jaroj vere temis pri unuopaj esperantistoj en diversaj landoj. Oni ne povis ankoraŭ paroli pri landaj movadoj, nek pri afrika movado, gvidata de afrikanoj, kaj nuntempe ni havas ambaŭ, ĉu ne? Kvankam la ekonomia situacio en Afriko ne estas tre facila kaj aliaj kondiĉoj por agadoj ne estas ĉiam facilaj, tamen en pluraj landoj de Afriko ni havas veran landan Esperanto-movadon, kaj kontakto inter tiuj landoj kreskas. Ni eĉ havas Afrikan Komisionon, en kiu membras kaj partoprenas nur afrikaj esperantistoj kaj kiun ili mem gvidas, tute same kiel ĉe la regiona agado en Ameriko, Azio, Eŭropo. En tiu senco la afrika movado maturiĝis kaj fariĝis tute egal-nivela kiel tiuj en la aliaj mondopartoj.

Tio, kio ankoraŭ mankas en Afriko, estas havi kelkajn vere fortajn landajn movadojn kiel ni havas ekzemple en Azio, kiuj povus esti motoro de la movado en la tuta kontinento. Do laŭ mi la sekva ŝtupo en Afriko estos krei kaj iniciati tiajn movadajn centrojn tra la kontinento, kiuj

povos helpi kreskigi la movadon en la landoj kie ankoraŭ estas nur kelkaj esperantistoj.

E-Redakcio: Ĉu vi povas ion diri pri la nuntempa agado de UEA pri eksteraj rilatoj, kaj pri la propono pri kunlaboro de E-Redakcio de Ĉina Radio Internacia?

Mark Fettes: Jam de multaj jaroj UEA havas solidarecon kun UN kaj Unesko, kiun oni ofte nomas agado pri eksteraj rilatoj. Tiaj rilatoj estas la plej bona maniero por malfermiĝo de la Esperanto-movado al dialogo kun aliaj movadoj pri sociaj kaj kulturaj temoj, ĉar multaj homoj en la mondo havas samajn aŭ similajn valorojn kaj celojn, kiel ni esperantistoj. Sed ofte ni ne malfermas nin al tiuj aliaj movadoj, kaj ni maltrafas la ŝancon de kunlaboro kaj reciproka subteno. Mi tre ŝatus, se via radio povus ankaŭ helpi disvolvi la rilatojn en la interkompreno inter ni esperantistoj kaj tiuj aliaj movadoj, ekzemple movadoj por edukado, movadoj por homaj rilatoj, movadoj por kultura dialogo kaj similaj. Ili vere estas tre interesaj kaj aktualaj temoj, kiuj okazas sur tiu ĉi kampo.

Mi ĉiam serĉas manierojn klerigi esperantistojn pri tio, ke ni ne ĉiam pensu nur pri lingvaj aferoj. Esperanto vere estas multe pli ol nur lingvo, ĉu ne? Tial mi tre ŝatas la emfazon de viaj elsendoj ankaŭ pri kulturaj aspektoj de Ĉinio. Mi pensas, ke tio estus certe tre valora, se vi povus iomete pliampleksigi ĝin, ekzemple pri kultura dialogo, daŭripova evoluo kaj similaj internaciaj temoj. Tio estos tre bonvena kontribuo.

Stabileco kaj kontinueco estas gravaj aspekto

Intervjuo kun Veronika Poór, nova ĝenerala direktoro de UEA

E-Redakcio: Ĉu vi jam komencis labori kiel ĝenerala direktoro de UEA? Ĉu vi povas iom priskribi la nunan laboron, ekzemple la laboro plenumata aŭ farata? Kio diferencas inter la nuna rolo kaj la antaŭa pozicio en E-organizo? Kiu inter ili estas pli grava al vi?

Veronica Poór: Mi komencos labori kiel Ĝenerala Direktoro de UEA post la emeritiĝo de la nuna Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller, en la unuaj monatoj de 2016.

Nuntempe mi ĉefe zorgas pri la transdono de konoj al la novaj estraranoj de TEJO, kiuj transprenas de mi la taskarojn. Kiam mi estis estrarano de TEJO, mi respondecis pri 4 kampoj: homaj rimedoj (HR), aktivula trejnado (AT), scienca kaj faka agado (SFA) kaj eksteraj rilatoj (KER), aldone mi ankaŭ helpis rilate al subvencipetoj kaj laŭbezone ankaŭ en aliaj fakoj, sekve estas multo por transdoni. Mi ankaŭ ĝuplene kontribuas al Muzaiko, retradio-kanalo kiu elsendas en Esperanto senĉese.

Pri la malsimilecoj inter la diversaj roloj mi povus rakonti multege, kaj mi timas ke ne eblas adekvate resumi ilin, mi nur povas diri ke mia celo ĉiam estis laŭeble plej kvalite kaj kontentige plenumi miajn diversajn taskojn, ĉu en la Esperanto-komunumo, ĉu ekster ĝi.

E-Redakcio: Vi iam diris, ke se elektita, vi volus pli emfazi komunikadon kaj la laboron por ricevi ekstermovadajn subvenciojn. Ĉu vi povas konigi la detalan planon por tiu celo?

Veronica Poór: Mi tre ĝojas ke la propono de la Komitata Forumo de UEA dum la 100-a UK iras en tre similan direkton, nome pli ol duono de la akceptitaj rekomendoj de la Komitataj Forumoj rekte rilatas al komunikado kaj/aŭ subvencipetado. Estas tre kuraĝige sperti ke miaj ideoj pri kio estas emfazenda en la nuna momento en UEA estas en harmonio kun la ideoj de la Komitato.

E-Redakcio: Ĉu vi jam havas planon por emfazi la komunikadon?

Veronica Poór: Por la direkto sekventas la decidoj de la Komitato. Por utilaj realigplanoj nepras detale koni la organizon de interne, sekve mi ne faros tiajn planojn de “ekstere” dum mi ankoraŭ ne konas ĝisfunde la fortojn, malfortojn, eblojn kaj minacojn de la situacio de UEA.

E-Redakcio: Unu el la aliaj kandidatoj, Nikola Rašić, diris, ke li volas alporti stabilecon kaj kontinuecon al la E-movado. Kiu laŭ vi estas la plej urĝa tasko de UEA? Kiel oni akcelu la celon aŭ plenumu la taskon?

Veronica Poór: Mi plene konsentas kun Nikola, ke la atento al stabileco kaj kontinueco estas gravaj aspekto de la ekofiko. Mi tre ĝojas pro la jam sentebla helpemo kaj subtenemo de Osmo Buller por laŭeble certigi la glatan transprenon.

Pri plej urĝaj taskoj malfacilas elekti, kompreneble tre gravas la realigo de la nova retejo de UEA, kaj mi tre



ĝojas vidi ke la Estraro jam faris la unuajn paŝojn por ĝia realigo. Mi ankaŭ ĝojas vidi ke daŭras kaj plifortiĝas la subteno al Aktivula Maturigo, agadkampoj, pri kiu mi ne senkiale respondecis en la Estraro de TEJO.

E-Redakcio: Ĉu via profesio nanoteĥnologio aŭ spertado helpas vin en la nova rolo de ĝenerala direktoro?

Veronica Poór: Jes, certe! Kiel natursciencisto mi lernis multe pri teamlaboro, teamgvidado, atingo de celoj, ekzakteco kaj mi havas la trejnadon en travido de kompleksaj sistemoj. La plej granda malsimileco estas en la reeĥo, kiel esploristo mi havis tre rapide klaran respondon pri ĉu mi bone pensis aŭ ne. Aldone indas menci, ke dum mia studado mi ankaŭ aktivis plurmaniere, ekzemple mi estis la reprezentanto de la fizikstudentoj en la Senato de la Scienca Fakultato.

E-Redakcio: Vi diris, ke via personeco taŭgas fari

malfacilajn kaj respondecajn decidojn. Do ĉu vi renkontis malfacilon en la nova laboro kaj kiel vi decidis?

Veronica Poór: Kiel estrarano de TEJO mi de proksime vidis ke la rolo de Ĝenerala Direktoro estas ankaŭ fari malfacilajn decidojn, kaj mi tre alte taksas la zorgajn agojn de la Ĝenerala Direktoro, Osmo Buller. Malgraŭ ke mi ne jam renkontiĝis kun malfaciloj en la laboro, mi certas ke venos tempo kiam mi devos fronti ilin. Kiam mi pensas al tiuj estontaj situacioj, min kuraĝigas kaj certigas ke mi spertas la konstantan subtenon kaj kunlaboron de la Estraro, kion mi profunde dankas.

E-Redakcio: Estas nova tendenco, ke novuloj kaj junuloj ludas pli kaj pli gravan rolon en la E-organizo kaj E-movadoj. Laŭ vi, krom entuziasmo kio mankas al la nuna E-movado, ĉu la nova generacio alportos reformadon al antaŭa labor-sistemo de E-organizo?

Veronica Poór: Rimarkeblas, ke nuntempe sociaj organizoj kaj movadoj devas trovi novajn manierojn funkcii. Mi ĝojas partopreni en tiu procezo en la Esperanto-movado.

Aldone, mi sentas ke mi estas tre bonŝanca, ĉar multaj entuziasmaj kaj lertaj personoj ĉirkaŭas min, sendepende de iliaj aĝo aŭ sperto en la movado. Mi antaŭĝojas en la nova posteno daŭrigi la kunlaboron kun ili kaj kun aliaj por-Esperanto fervore agemuloj, por atingi, kion eblas, por la sukceso de UEA kaj sekve de Esperanto.

Kantante sub la pluvo

Amikeco pere de napolaj kanzonoj en la 100a UK

Alessandra Madella

En sia parolado dum la ferma ceremonio de la 100a Universala Kongreso en Lillo, prezidanto de la Universala Esperanto Asocio S-ro Mark Fettes elokvente rememoris sian fruan ekinteresiĝon pri la efika ena funkciado de Esperantaj institucioj kiel juna studento. Sed li ankaŭ sincere agnoskis alian motoron de Esperanto, kiu permesis al ĝi daŭri kaj kreski dum unu jarcento, eĉ pli profunde ol larĝspiraj instituciaj aŭ movadismaj strategioj. Tio estas la senĉesa kreado de personaj ligoj inter la samideanoj, kiuj ĝoje investas sian tempon kaj intereson jaron post jaro en la kultivado de plezuraj, memorindaj momentoj kun geamikoj dum la kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj. Tiu energia plenpleno de amikeco estas la sekreta rezervo kiu subtenis Esperanton trans la plej malfacilaj momentoj de ĝia historio, kaj kiu ĉiam jam realigas parton de ĝia kora utopia promeso.

Grupeto de italaj samideaninoj el la urbo Parma tuj kaptis tiun ĉi spiriton, uzante la internacian popularecon de napolaj tradiciaj kanzonoj por forigi timidecon kaj forĝi fortajn ligojn inter la partoprenantoj en la ekskursoj de la Lilla UK. Inter la dek gepartoprenintoj el Parma, kvar samideaninoj estis precipe aktivaj pere de tiu amikema kantado. Por ĉiuj el ili estis la unua UK, post unujara lernado de Esperanto. Maria Giardino, Lia Tamborini kaj Speranza Annunziata hobie studas korusan kantadon kun profesia instruistino. Dum Patrizia Rivaldi, kiu instruas jogon, rondiris Ĉinion per aŭtomobilo kaj entuziasmiĝas pri orienta vegetarana kuirarto, facile trovis kun-kantemajn simpatiantojn de napolaj kanzonoj el Eŭropo, Azio, Israelo, Usono kaj Novzelando. Precipe S-ino Akiyoshi Atsuko kaj S-ro Ikenoya Tadahumi el Japanio estis tre viglaj. Ili surprizige montris al ni sian konon de tekstoj rekte en la bela dialekto de la suda urbo Napolo,

kaj kompetente instruis la korektajn esperantigitajn versiojn de la famaj napolaj kanzonoj “Ho suno mia” kaj “Sankta Luĉia”. Fakte ŝajnas ke kanzonoj de la riĉa napola tradicio estas ofte instruataj al infanoj en japanaj baz-lernejoj, inkluzive de iuj kantoj kiujn eĉ italoj ne tiel multe konas.

Ankaŭ en Kunming mi tuj komprenis ke napolaj kanzonoj estas muzike la plej rekonebla tradicio de Italio. Fakte la Profesia Artkolegio de Kunming, kie mi instruas, havas sian plej originan kaj koran identecon en muziko, kiel povis bone rimarki en memorindaj spektakloj la partoprenantoj de la IFEF kaj Ĉina kongresoj last-maje. Estas do kutime por ties gestudentoj kaj geïnstruistoj profesi-nivele kanti sonopovajn solojn je la fino de la manĝofestoj. Sed ankaŭ en tute normalaj familioj de Kunming, manĝofestoj kun geamikoj ofte finiĝas per spontana kantado, kiu kulture montras la romantikemon kaj la karakteran plenan de la kantistoj. Kantemulo estas sindonema kaj nudigas per siaj notoj sian animon. Ofte, por omaĝi italanon ĉe sia tablo, post Yunnan-aj nacimalplimultaj kantoj gastigantoj eksplodas en tut-pulmaj napolaj kanzonoj. Kiam mi mem devas sole kanti, mi preferas alfronti “Belulin ĝis ĝis” (“Bella ciao” en la itala), la italan partizanan kanton de la dua mondmilito kiu estas same internacie rekonebla, sed bonŝance melodie pli facila. Multe da ĉinaj muzikemaj homoj pensas ke ĝi estis origine jugoslava kanto, ĉar ĝi havis tre gravan rolon en jugoslava filmo pri mondmilitaj partizanoj kiu en la pasinteco multe famis en Ĉinio. Tamen la milana muzikologo Roberto Leydi trovis la originon de ĝia melodio en manbata kanto de italaj infanoj “Avinjo estas maljunulino” kaj tiu de ĝiaj vortoj el la itala balado “Tombaj floroj,” en kiu fraŭlino ĵuras ke

Alessandra Maddella

Esperantistino el Parma, Italio, doktorino pri komunikado iam studinta en Japanio kaj Usono. Ekde Usono, ekde marte 2013 instruas komunikadon, film-historion, filozofion, mediat-rilatajn kursojn kaj Esperanton en Kunming Profesia Artkolegio, Yunnan-provinco de Ĉinio. En la jaro 2014 ekverkis por Ĉina Radio Internacia, kaj multe kontribuas por la reta rubriko: El Mia Rigardo <http://esperanto.cri.cn>.



ŝi preferus morti ol lasi sian amaton. Floro kreskos sur ŝia tombo por atesti la povon de amo, kiel en la partizana kanto la floro de la mortinta partizano montros al la mondo la ĉiaman gravon de libereco.

En nia samideana kantado dum la ekskursoj de la 100a UK, la Parm-aninoj certe distingiĝis. Speranza portis perfektan napolan akcenton, dum Maria pasie rakontis la historion de iuj famaj kanzonoj. Ekzemple, “Mala femmena” (“Virinaĉo”) estis amara poezio verkita de la napola komedisto Totò, ĉar lia edzino (“la plej bela, plej amata kaj malamata virino”) volis lasi lin kaj ne plu permesi ke li vidu sian filinon, eĉ se li estis promesinta al ŝi siajn tutajn havaĵojn por povi eĉ mallonge esti kun la infanetino. Nia amikino Lia omaĝis al la flandraj gastigantoj de la kongreso pere de “Dominique”, franc-lingva kanto pri tre simpla kaj gaja junulo kun forta kredo je Dio verkita en la sesdekaj jaroj de la belga katolika monaĥino Fratino Rideto, kiu dum kelka tempo iĝis populara en la tuta mondo. Fakte, ankaŭ se la persona historio de Fratino Rideto mem estis tre malfacila kaj trista post ŝia eliro el la ordeno (kiel bone montras la biografia filmo “Soeur Sourire” ---Fratino Rideto --- realigita en 2009 de la belga reĝisoro Stijn Coninx), ŝia nomo ankoraŭ troveblas kiel gaja simbolo sur la insignoj de kafejoj kaj restoracioj en la flandra regiono inter Belgio kaj Francio. Do, kiam Lia eksonigis ĝiajn notojn, afabla Franca samideanino tuj promesis trovi por ni la esperantigitajn vortojn de “Dominique”.

La kontribuo de alilandaj samideanoj al la sukceso de la spontana komuna kantado estis same grava. Ne nur ili energie manklakis kaj kuraĝige fotadis la gekantemulojn ekde la komenco, sed eventuale ankaŭ ili entuziasme

partoprenis kaj ene kaj ekstere, dum la kelkaj paŭzoj de la flandra pluvo. En la lasta ekskurso de la kongreso, nia japana amiko Tadahumi gvidis nian korusan kantadon de la fama franca popola kanto “Frato Jako” en la centra placo de Bolonjo-ĉe-Mar, post vizito al la statuo de Zamenhof, al la E-a muzeo kaj al la teatro en kiu D-ro Esperanto alparolis la unuajn kongresanojn pere de sia “arta lingvo” en 1905. Usona junulo kiu instruas la anglan en Yunnan kaj bone parolas la mandarenan altigis la verdan flagon super improvizita koruso de ses landoj. Post tiu voĉa eksplodo, babilado ekfluis kun nova energio kaj eĉ kutime krokodilemaj gekomencantoj ne plu timis amikiĝi tra la mondo.

En unu el la lastaj numeroj de la ILEI revuo “Juna Amiko” la usona profesoro Dennis Keefe, bone konata de ĉinaj gesamideanoj por sia agado en la insulo Hainan, skribis ke estas tre grave instrui Esperanton al plenkreskuloj komencante de iliaj specifaj intereso. Sendube la komuna kantado dum la kongresaj ekskursoj montris la entuziasmon kiu ekzistas internacie pri napolaj kanzonoj kaj pri amikaj interŝanĝoj pere de muziko, kaj montras certe exploreblan vojon por plia plenkreskula lernado. Samtempe, kantado en placoj, stratoj kaj restoracioj ankaŭ estis konkrete spertita maniero pere de la volontuloj de la Lilla kongreso (multajn el kiuj ĉinaj gesamideanoj bone konas, ĉar ili partoprenis en la IFEF kongreso de Kunming) por ekinteresiĝi la lokan loĝantaron pri Esperanto. En tiu senco, napolaj kanzonoj povis iom kontribui igi Esperanton pli videbla kaj nediskuteble reala, ankaŭ en la lokoj en kiuj ĝi unue naskiĝis.

100-a UK LILLO, 2015

La 26an de julio laŭ la loka tempo, solene inaŭguriĝis la 100a Universala Kongreso de Esperanto en Lillo, Francio.

110 jaroj pasis ekde la 1a Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Mar. Dum la 110 jaroj, Universala Kongreso festis ĉiujare escepte du paŭzoj dum la mondaj militoj, ĉijare ni revenas kaj renkontiĝas en Lillo, proksima al la unua kongresa urbo Bulonjo-ĉe-Mar. De la 1a ĝis la 100a kongreso, tio estas granda paŝo, en kiu ni ĉiuj antaŭenigas efektivigon de nia internacia lingvo kaj altigas ĝian kapablon por interkomprenigi homojn de la tuta mondo.



ekster la kongresejo - de Selena

preparo en la lasta tago antaŭ la malfermo - de Selena



ekskursi en Lillo - fotita de Lucia



Bulonjo-ĉe-Mar - de Lucia



budo por 101a UK - de Lucia



direkto al kongresejo - de Lucia

preparo en la lasta tago antaŭ la malfermo - de Selena



usona koredevena paro - de Lucia



litova esperantisto Edgar Piščikas - de Lucia



kongresanoj - de Lucia



40 jaroj de Ĉinio kaj EU, Sorbi dinamismon el Ĉinio kreskanta Ĉi-jare estas la 40a datreveno de la fondiĝo de la diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj EU. Dum tiuj jaroj alttavolaj intervizitoj de la du flankoj oftigas laŭgrade, reciprokaj komerco kaj investo impetas pli forte, kaj aktivaĵoj por interŝanĝo de humanisma kulturo montriĝas pli kaj pli strategiaj kaj mekanismaj, kaj sekve fariĝis grava rimedo por pliigi komprenon kaj fidindecon inter Ĉinio kaj EU.

Politikoj

La 6an de majo 1975, la tiama ĉina ekstera ministro Qiao Guanhua kaj vizitanta en Ĉinio Christopher Soames, la tiutempa vicprezidanto de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK, tio estas nun Eŭropa Unio), havis interparoladon kaj venis en akordon pri tio, ke Ĉinio kaj EKK starigu inter si oficialajn rilatojn. Tiu tago datigis la fondiĝon de diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj EU. Kvardek jarojn ekde tiam, la rilatoj inter Ĉinio kaj EU, kiuj travivis internaciajn metamorfozojn, akiris al si nekontesteblajn atingojn, kaj nun ili, elanaj kaj energiaj, evoluas sur firma trako, kaj antaŭ ili etendiĝas pli vasta horizonto.

Ĉinio kaj Eŭropo estas gravaj fortoj en la nuna mondo. Kvankam inter Ĉinio kaj Eŭropo ekzistas diferencoj, ekzemple, en socia sistemo, politika koncepto, kultura tradicio, kaj evolua stadio, tamen la rilatoj inter Ĉinio kaj EU ankoraŭ plu sin antaŭenpuŝis. Ĉinio altgrade traktas kaj atentis EU-on kaj firme subtenas la konstruadon de eŭropa integriĝo; dum EU deziras, ke Ĉinio estu stabila kaj prospera kaj ludu pli kaj pli gravan rolon en la mondaj paco kaj evoluo. La historiaj spertoj pruvis, ke inter Ĉinio kaj EU ekzistas reciprokaj respektoj, kaj ĝuste pro la sufiĉa respektato la rilatoj inter Ĉinio kaj EU moviĝas senĉese ĝis plejnova evolustadio.

En 1996, iniciatite de Ĉinio, Ĉinio kaj EU komencis inter si dialogon pri homaj rajtoj.

En 1998 gvidantoj de Ĉinio kaj EU starigis la renkontiĝan mekanismon de ŝtatestroj, kaj de tiu momento la du partioj komencis rektan strategian

komunikadon, kaj decidis, ke Ĉinio kaj EU fondu la konstruivan partnerecon longe stabilan kaj frontantan al la 21a jarcento. En 2003 gvidantoj de Ĉinio kaj EU kune proklamis establi “plenampleksan strategian partnerecon”.

Aparte menciindas, ke aprile 2014 la ĉina ŝtata prezidanto Xi Jinping faris historian viziton al EU, tio estas la unua vizito de ĉina ŝtata prezidanto al la ĉefstabejo de EU en la 40 jaroj ekde la establiĝo de diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj EU. Dum la vizito Xi Jinping proponis kune elformi la partneran rilaton, karakterizatan de la kvar facetoj: paco, kreskigo, reformado kaj civilizo. Tiu propono ricevis aktivan reagon de EU.

Nuntempe inter Ĉinio kaj EU establiĝis pli ol 70 konsiliĝaj kaj dialogaj mekanismoj koncerne al multaj fakoj, ekzemple: politiko, ekonomio kaj komerco, humanisma kulturo, scienco kaj tekniko, energirimedo, medio kaj ekologio.

Aktuale, Ĉinio kaj EU havas multege da komunaj intereso, sed ankaŭ frontas al iuj similaj demandoj kaj defioj. Ĝuste kiel diris Xi Jinping, kiam li intervidiĝis kun Martin Schulz, prezidanto de la Eŭropa Parlamento: “La partnera rilato kun kvar ecoj nun estas evoluanta antaŭen. Mi esperas, ke Ĉinio kaj EU kune klopodos, por ke la rilato floru kaj donu fruktojn.”

Ekonomio kaj Komerco

La ekonomia kaj komerca kunlaboroj inter Ĉinio kaj Eŭropa Unio (EU) estas la plej gravaj kaj plej impresaj rilatoj inter ili. Trarigarde al la 40 jaroj de la fondiĝo de iliaj diplomaciaj rilatoj, la ekonomio kaj komerco koncerne al Ĉinio kaj EU, pozitive movate de ili ambaŭ mem, kreskis rapide kaj ekvilibre. Nun ilia kunlaboro ĉe ekonomio kaj komerco montriĝas senprecedence intima: EU en la sinsekvaj 11 jaroj estas la plej granda komerca partnero de Ĉinio, kaj ankaŭ la plej granda importofonto kaj la dua plej granda eksportomerkato de Ĉinio; dum Ĉinio estas la plej granda importofonto kaj la dua plej granda komercopartnero de EU.

Efektive, en la jaro 1975, kiam Ĉinio kaj Eŭropa Ekonomia Komunumo (nome la antaŭulo de Eŭropa Unio) fondis inter si diplomaciajn rilatojn, la totala sumo de la du-partia komerco kalkuliĝis al nur 2,4 miliardoj da usonaj dolaroj. En 1979, laŭ statistiko de EU, la totala sumo de la importoj kaj eksportoj inter Ĉinio kaj EU estis 4,689 miliardoj da usonaj dolaroj, nur 0,6% el la kompleta sumo de la ekstera komerco de EU. En la tutaj 80a kaj 90a jardekoj de la pasinta jarcento la komerco inter Ĉinio kaj EU kreskis preskaŭ duoble en ĉiu kvina jaro. En la jaro 1999 la du-partia komerca sumo jam atingis 55,7 miliardojn da dolaroj. Tiam EU fariĝis la kvara plej granda komerca partnero de Ĉinio, dum Ĉinio staris en la kvina loko inter la komercaj partneroj de EU. En la 21a jarcento, kun la stariĝo de la plenampleksa strategia partnereco inter Ĉinio kaj EU, ilia alttavolaj intervizitoj oftigas laŭgrade, kaj ilia komerco impetas eĉ pli forte. Laŭ statistiko, en 2014 la du-partia komerca sumo venis al 615,1 miliardoj da dolaroj, tiu sumo estas

ĉirkaŭ 250-oble pli granda ol tiu en la momento, kiam Ĉinio kaj EU fondis por si diplomaciajn rilatojn.

En komercado kun giganta kvanto ne eviteblas apero de interfrotiĝo kaj malkonkordo, sed notindas, ke Ĉinio kaj EU havigis al si mekanismon por solvi problemojn, kiuj aperis en komercado.

Tio, kio intime ligiĝas kun komerco, estas reciproka investado. Ĝis 2014, la rektaj investaĵoj de EU en Ĉinio sumiĝis je 96,6 miliardoj da dolaroj, la sumo multe superis tiun de Ĉinio en EU, tio estas, 49,9 miliardoj da dolaroj. En la lastaj jaroj tamen la investado de Ĉinio en EU kreskis tre rapide, ekzemple, en la du antaŭaj monatoj de 2015 la investaĵoj de Ĉinio en EU estis 3,36 miliardoj da dolaroj, 10,5-oble pli multe ol tiuj en la sama periodo en 2014.

En 2015 Britio, Germanio, Francio kaj Italio, kiel ĉefaj landoj de EU, sinsekve proklamis, ke ili aliĝis al la Azia Infrastruktura Investo-Banko (AIIB). Tiu ĉi agado montras, ke EU volantas profundigi kunlaboron kun Ĉinio.



Kulturo

“Rilateco inter ŝtatoj dependas de amikeco inter ties popoloj.” En tiuj 40 jaroj, ekde la fondiĝo de diplomatiuj rilatoj inter Ĉinio kaj Eŭropa Unio (EU), la du partiaj aktivecoj por interŝanĝo de humanisma kulturo oftigas tagon post tago, montriĝas pli kaj pli strategiaj kaj mekanismaj, kaj sekve fariĝis grava rimedo por pliigi komprenon kaj fidindecon inter Ĉinio kaj EU. Nuntempe, la interŝanĝo de humanisma kulturo estas konsiderita kiel “la tria apogilo” apud la aliaj du: la rilatoj de ekonomio kaj komerco inter Ĉinio kaj EU kaj ilia politika dialogo. Kvankam Ĉinio kaj Eŭropo, spite al la granda distanco, havas tre longan historion en kontakto, tamen en relative longa tempo inertis interŝanĝo de kulturo inter ili. Sed la situacio ŝanĝiĝis en 2003, en kiu Ĉinio kaj EU subskribis komunan deklaron pri solidigo de kulturaj interŝanĝo kaj kunlaboro. Ankaŭ en 2003 Francio organizis la aktivadon “Jaro de Ĉina Kulturo en Francio”; Germanio okazigis la aktivadon “Festivado de Kultura Ĉinio en Germanio”; Ĉinio kaj Italio subskribis memorandon por instali respektive kulturen centron, kun Aŭstrio Ĉinio subskribis plenuman planon por kultura interŝanĝo, kaj simile.

Post la jaro 2006, kun la grandiĝo de la povo de EU kaj la malvolviĝo de la rilatoj inter Ĉinio kaj EU, la interŝanĝo de humanisma kulturo inter la du partioj tagon post tago oftigis, kaj pli gravas, ke la du partioj kreis mekanismojn de kultura interŝanĝo en diversaj niveloj kaj en pli vasta enhavo. En 2011 estis “Jaro de Junulara Interŝanĝo inter Ĉinio kaj EU”; en 2012 okazis “Jaro de Kultura Dialogo inter Ĉinio kaj EU”; en la sama jaro oni organizis la unuan kunvenon por la altnivela dialoga

mekanismo de Ĉinio kaj EU pri humanisma kulturo, kaj septembre 2014 tia dua kunveno havis lokon en Pekino. En tiaj cirkonstancoj la nombro de alirantoj kaj elirantoj inter Ĉinio kaj Eŭropo draste kreskis. Nuntempe la nombro atingis 6 milionojn da homoj en ĉiu jaro, tio estas triobla pli multe ol antaŭ 10 jaroj. Krome, nun estas pli ol 240 miloj da ĉinaj studentoj, kiuj restas en Eŭropo por studi, kaj samtempe, proksimume 35 miloj da studentoj el eŭropuniaj landoj studas en Ĉinio – tiu nombro estas dekono de ĉiuj fremdaj studentoj.

En Eŭropa Instituto, unu el la plej famaj edukaj kaj akademaj institucioj en la mondo, instaligis “Ĉina Biblioteko” en la jaro 2014. La biblioteko, kiu entenas pli ol 100 milojn da libroj kaj specife okupiĝas pri Ĉinio, nun fariĝas alia grava fenestro, tra kiu Eŭropo ekkonas Ĉinion. “Rilateco inter ŝtatoj dependas de amikeco inter ties popoloj, amikeco inter la popoloj implicas altiron de la koro.” Kun akumuliĝo tra 40 jaroj, la radiko de la interŝanĝo de humanisma kulturo inter Ĉinio kaj EU des pli profundigis kaj fortikiĝis.

Sciencteknika kunlaboro

La historia ŝanĝiĝo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Eŭropa Unio (EU) plene speguliĝis en sciencteknika kunlaboro. La sciencteknika kunlaboro inter Ĉinio kaj EU komenciĝis de 1981. La du partia kunlaboro en scienco kaj tekniko travivis la evoluprocezon de laŭgradaj ampleksiĝo, normaliĝo, maturiĝo, perfektigo, ĉu en kvanto, ĉu en kvalito.

En 1991 fondiĝis la laborgrupo por sciencteknika kunlaboro inter Ĉinio kaj EU, kaj ekde 1998 ĝi nomiĝas la gvidkomitato de sciencteknika kunlaboro inter Ĉinio kaj EU, regule konsiliĝante pri kunlabora politiko kaj agaj paŝoj.

Kreemo de scienco kaj tekniko estas kerno de evoluiga strategio de Ĉinio, la monrimedoj asignitaj de Ĉinio por scienco kaj tekniko kreskis je 20% en ĉiu jaro. Fone de tiu ĉi situacio, la kunlaboro inter Ĉinio kaj EU en sciencteknika kaj novigo estis plue fortigita. En 2003 Ĉinio kaj EU subskribis la kunlaboran interkonsenton “Projekto Galilejo”, kaj tiel Ĉinio fariĝis la unua neeŭropunia lando partoprenanta en la projekto. En la sepa kunveno de la gvidkomitato de sciencteknika kunlaboro inter Ĉinio kaj EU, okazinta novembro de 2008 en Bruselo, Ĉinio kaj EU venis en akordon pri la partnereca plano de sicenco kaj tekniko, tio estas nova mekanismo, altnivela kaj egala, de sciencteknika kunlaboro inter Ĉinio kaj EU, kaj difinis la reagon al klimata ŝanĝiĝo, energifonton, biologion kaj aliajn kiel ĉefaj kunlaboraj terenoj. En 2010 Ĉinio kaj EU subskribis komunan deklaron, en kiu oni aparte instigas mezajn kaj malgrandajn entreprenojn el Ĉinio

kaj EU fari kunlaboron pri kreemo de energifonto kaj sciencteknika, kaj pro tio Ĉinio aparte fondis specifan fondaĵon, daŭrantan je tri jaroj kaj asignitan per 100 milionoj da juanoj, por energiŝparo kaj emisiredukto fare de mezaj kaj malgrandaj entreprenoj el Ĉinio kaj EU.

Ĉinio kaj EU ankaŭ faris kunlaboradon kaj kunlaboron en atomenergio. Ĉi-rilate la Eŭropa Atomenergia Komunumo disvolvis kunlaboron kun Ĉinio en la plano ITER (la Internacia Termonuklea Eksperimenta Reaktoro).

Cetere, Ĉinio estas ĉefa kunlabora partnero en la eŭropunia nova plano “Horizonto 2020”, destinita por 2014-2020 kaj asignita per 80 miliardoj da eŭroj.

El ĉi-supraj aspektoj oni povas vidi, ke Ĉinio estas ne nur partoprenanto de eŭropuniaj planoj, sed ankaŭ egala kunlabora partnero de EU. Nun Ĉinio partoprenas en pli ol 400 sciencteknikaj programoj de EU rilate al energifonto, bioteknologio, agrikulturo, medicino, naturaj resursoj kaj multe aliaj. En 2013 Ĉinio kaj EU organizis la unuan dialogon pri novigo kaj atingis komunan komprenon en multaj kampoj, kiel en agrikulturo, nutraĵo, bioteknologio, urbanizado, aviadindustrio, informadiko kaj telekomunikado.

40

jaroj de Ĉinio kaj EU

Maj. 06, 1975, Ĉinio kaj la Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK, tio estas nun Eŭropa Unio) starigis inter si oficialajn rilatojn. Fondiĝis diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj EU.

Aprile 1978, oficiale subskribiĝis komerca interkonsento inter Ĉinio kaj EEK.

Aprile 1984, la unua politika interkonsiliĝo sur nivelo de eksterlandafera ministro inter Ĉinio kaj EEK.

Maje 1985, estis subskribita kunlabora interkonsento pri komerco kaj ekonomio inter Ĉinio kaj la EEK.

Junie 1989, la EEK decidis frostigi rilatojn kun Ĉinio kaj apliki serion da sankcioj, inkluzive de malpermeso vendi armilojn al Ĉinio. La rilatoj inter Ĉinio kaj EU estis serioze damaĝitaj.

Oktobre 1990, estis nuligita plejparto de sankcioj al Ĉinio.

Marde 1998, starigo de plenampleksa partnereco inter Ĉinio kaj EU.

Aprile 1998, unua renkontiĝo inter gvidantoj de Ĉinio kaj EU en Londono. La du flankoj publikigis komunan deklaron, starigante longdaŭran kaj stabilan konstruivan partnerecon, fronte al la 21-a jarcento kaj decidis okazigi la renkontiĝon en ĉiu jaro.

Septembre 2001, starigi plenampleksan partnerecon inter Ĉinio kaj EU en la 4a renkontiĝo de gvidantoj de Ĉinio kaj EU.

Oktobre 2003, estis subskribita kunlabora interkonsento “Projekto Galilejo” kaj starigi mekanismon pri dialogo de industria politiko inter Ĉinio kaj EU en la 6a renkontiĝo de gvidantoj de Ĉinio kaj EU.

Novembre 2007, starigi altrangan ekonomian kaj komercan dialogan mekanismon ĉe vicĉefministra nivelo inter Ĉinio kaj EU.

2011, Jaro de Junulara Interŝanĝo inter Ĉinio kaj EU, la unua aktivaĵo kun ĉeftemo post starigo de diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj EU.

Novembre 2013, estis publikigita Strategia Plano pri Kunlaboro inter Ĉinio kaj EU 2020 en la 16a renkontiĝo de gvidantoj el Ĉinio kaj EU.

Maro 03 2014, ĉina ŝtata prezidanto Xi Jinping faris viziton al la sidejo de EU. Gvidantoj de la du flankoj atingis gravan komunan konon pri starigo de kvar partneraj rilatoj pri paco, kresko, reformado kaj civilizo.

Konkurso De Mallongaj Filmoj: “Teo kaj Amo”

“茶与爱情”微电影大赛

Aprile de 2014 komenciĝis la konkurso de mallongaj filmoj kun la temo “Teo kaj Amo”. Ĝi daŭris unu jaron kaj finiĝis aprile de 2015. Kun la aŭspicio de UEA, la konkurson ĉefe organizis Ĉina Radio Internacia, Zhejiang-a Agrikultura kaj Forstokultura Universitato kaj Hangzhou-a Asocio por Popularigi Te-Markon, kaj sponsoris Ĉina Ligo de Tetrinkejoj. Alvenis 45 filmetoj el 20 landoj de 4 kontinentoj. La partoprenantoj aĝas de 16 ĝis 63 jaroj, kaj plejpartaj estas junuloj. Ili estas studentoj, profesoroj, instruistoj, ĵurnalistoj, kantistoj, fotistoj, reĝisoroj, produktoroj, redaktoroj, registaraj oficistoj, komercistoj, kemiistoj, juĝistoj, verkistoj, artistoj, pentristoj, muzikistoj, inĝeniero interalie emeritoj.


18 filmetoj (pli ol triono) estis faritaj de ne-esperantistoj. Unuan juĝadon faris Ĉina Film-Artista Asocio, kiu prezentos 25 kandidatojn al la ĵurio, per voĉdono la 7 membroj de la ĵurio elektis filmojn premiitajn 10 unuajn, 3 specialajn kaj 12 duajn. Kaj la lastaj estas la triaj premiitaj filmetoj. 2 335 homfojoj voĉdonis por la premio: Filmeto plej Ŝatata de Retanoj (dek). filmfestivalo “Teo kaj Amo: Koloroj de l’ mondo” (16-24, aprilo, 2015, Zhejiang-provinco, Ĉinio)

En la filmfestivalo partoprenis 29 premiitoj el la 16 landoj.





Fotisto: Chen Qu(陈取), spertado de teo-kulturo
Fotisto: Chen Wenping(陈文萍), Strategia forumo de UEA pri Orientazia Movado
Fotisto: Tao Xinxin(陶欣欣), Litovia muzikbando Sepa kaj Asorbi





internacia vespero

SALUTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Nome de Universala Esperanto-Asocio, mi esprimas niajn gratulojn al Ĉina Radio Internacia pro ĉi tiu unika kaj valora konkurso.

En la nuna epoko, filmo kaj video fariĝis pli gravaj ol iam ajn antaŭe por kunligi homojn el ĉiuj kontinentoj.

Ne plu estas tiel, ke nur profesiuloj kun granda buĝeto povas produkti kaj disvastigi siajn kreaĵojn. Filmo fariĝis tre demokratia, fleksebla kaj malmultekosta rimedo, per kiu eblas ŝerci kaj seriozi, festi kaj protesti; per kiu eblas ekhavi pli veran bildon pri la ĉiutagaj zorgoj, espero kaj streboj de niaj kunhomoj tra la mondo.



Tiuj estas ankaŭ la celoj de Esperanto - unike demokratia, fleksebla kaj malmultekosta lingvo por tutplaneda komunikado. Tial UEA volonte subtenas ĉi tiun konkurson, kaj kunlaboros por sukcesigi ĝin.

Gratule kaj bondezire
Mark Fettes
Prezidanto
Universala Esperanto-Asocio
—— 国际世界语协会主席马克·菲特斯 （加拿大）

Unuvorte, via filmfestivalo estis sukcesa projekto pro tio, ke ĝi montris, ke Esperanto ne estas simpla lingvo sed ĝi estas kulturo-peranta lingvo. Per Esperanto tiom da terglobanoj kolektiĝis kaj sen tradukisto ni povis komunikiĝi perfekte. La filmfestivalo lasis historian spuron en Esperanto-historio. Mi esperas, ke Ĉina Radio Internacia daŭrigos la festivalon kaj fine ĝi fariĝos mondskala Esperanto-filmfestivalo. Ankoraŭfoje mi kore dankas al ĉiuj, kiuj planis kaj preparis la festivalon. Koran dankon.

Lee Jungkee
Estrarano de UEA pri azia movado
---- 李仲琦 国际世界语协会亚洲区负责人 （韩国）



获奖者感受：

Estis tute entuziasma semajno, ĉar ni vizitis unu el la plej interesaj lokoj en la mondo por mi, kio estas Ĉinio, kaj mi neniam estis ĉi tie. Do havi la ŝancon esti ĉi tie kun amikoj kaj kun esperantistoj ĉu lokaj ĉu alilandaj estis ege granda ŝanco kaj mi vere devas danki organizantojn de la konkurso pri teo kaj amo...

——Fabio Bettani (Italio)
法比奥·贝塔尼（意大利）

Mi plej ĉefe ŝatas, ke mi estis kun ĉinaj studentoj kaj normalaj homoj, kaj ni povis babili kaj ŝerci kaj mi scias kion ili ŝatas kaj tiel plu. Kaj certe mi tre ŝatis la landon, vidindaĵojn, muzeojn, kaj viziton ĉe ordinara ĉina familio. Estas tre interesa sperto.

——Marta Wierzbowska (Pollando)
玛尔塔·维日博夫斯卡（波兰）

Kiel diri, mi estas plena plena da impresoj, estas multe multe multe. Antaŭ hieraŭ ni dormis en la montoj kaj ni... mankas vortoj...la cerbo ne funkcias. Estas grandioza furiozeco. Mi nur volas diri grandan dankon...

——Daniel Voss (Germanio)
丹尼尔·福斯（德国）

Por mi, mi jam vizitis 33 landojn kaj Ĉinio tuj fariĝis la plej ŝatataj miaj landoj, ni diru la unu el le eble TOP5.

——Edgar Piščikas (Litovio)
艾德卡拉斯·皮斯茨卡斯（立陶宛）

Mi estis vere feliĉa. Krom la opinio kion mi spertis en tiu lando kompreneble estis la vera kabala vivo. Estas tre interese sperti ne turisman vivon ne turismajn objektojn sed alialan vivon...

——Olga Shiliaeva (Rusio)
奥莉加·西拉耶娃（俄罗斯）

Por mi estis nekredebla tiu sperto. Tiu lasta semajno estis unu el la plej belaj tagoj, kiun mi spertis en Esperantujo, estas nekredebla sperto.

Ni faris multajn aferojn kaj kutime la programo estas tre riĉa. Mi ĝuis multege. Kaj unua afero kiun mi volas substreki estas tiu tago, kiam mi restis kune kun ĉinaj kamparanoj, ĉar mi vidis, ke estis vere vere mirindaj spertoj, do estis ege bone vidi kiamaniere la ĉinoj laboras kaj vivas ĉi tie. Ni vere estis tre tre kune kun ili.

——Fabjo Montejro (Brazilo)
法比奥·罗伯托·莫塔·蒙泰罗（巴西）

Duan Yongxing, double sukcesa

Yu Jianchao

Okazis en majo (2015) la 11-a Tutlanda Kongreso de Esperanto kaj paralele la 67-a Kongreso de IFEF en Kunming, Yunnan-provinco en suda Ĉinio. Dum la du kongresoj partoprenantoj frande ĝuis la kvar artajn vesperojn kontribuitajn de Kunming-a Profesia Artkolegio, kies rektoro estas Duan Yongxing, esperantisto jam de la komenco de la 80-aj jaroj pasintjarcente.

Parolante pri la arta prezentado de Kunming-a Profesia Artkolegio, oni nepre rememoras la jaron 2012, kiam okazis la 45-a ILEI-konferenco ĝuste tie. La kolegio prezentis al la konferenco apartajn naciajn kaj internaciajn vesperojn. Nun ankoraŭ neforviŝeblaj estas la koloraj aktoradoj en la menso de Umeo, kiu spektis la spektaklon antaŭ tri jaroj.

Malsame ol kutima esperanta aranĝo kun nacia kaj internacia vesperoj, duobligis la artaj prezentadoj ĉi-okaze. Intevjuate, la rektoro de la kolegio sinjoro Duan Yongxing parolis unue pri la kvar prezentadoj, kaj de tio radias al sia tezo regi la kolegion. Li konigis, ke la kolegio akcentas kombinon de la teorio kun la aplikado, kaj integriĝon de studado, praktiko kaj esplorado. Radikiĝante en la fekundan teron de indiĝenaj folkloroj, la arta eduko de la kolegio evidentigas la karakteron de Yunnan-provinco kun 25 naciminoritatoj. Duan Yongxing konigis:

“La programo de la unua vespero fakte estas rekomendita kiel ensemblo de la Provinco. Ĉu en la artvaloro ĉu en la aktorado, la nia distingiĝas de alies prezentado pro la nekompareblaj etnaj elementoj. Ni celas kulturi la studentojn servi la socion, kaj samtempe

ili estu bezonataj de la socio. Tio estas la orientiĝo de nia kolegio.”

Kunming-a Profesia Artkolegio situas ĉe Dianchi-lago de la ĉefurbo de Yunnan-provinco. Establiĝas en la kolegio kelkaj institutoj kaj sep subkolegioj kun pli ol 30 fakultatoj. La kolegio posedas siajn studion, aŭditorion, muzikhalon, teatrejon kaj grandajn solonojn aŭ terenojn por ke studentoj laŭfakte faru ekzercadon. La kolegio ŝarĝas sur sin taskon kulturi studentojn por diversaj prezentadoj, ekzemple la destinita tasko por fama teatraĵo Dinamika Yunnan, iniciatita de fama dancistino Yang Liping. La kolegio liveras senpagan edukon aŭ stipendion al studentoj el malriĉaj familioj precipe tiuj venintaj de montaraj vilaĝoj ĉe landlima regiono, kie abundas indiĝenaj folkoloroj. Protekti la plej originajn artojn kaj heredigi la etnajn kulturojn estas la deviga tasko de la kolegio.

Amikojn forte impresis la dueto de argila fluto kaj erhu—duarĉa instrumento, “Eleganteco dum miljaroj” estas la titolo. Duan Yongxing donis al la kvar prezentadoj titolojn laŭvice: Rozkoloraj Nuboj Sude, por konigi la provincon ĝenerale; Kantado kun Dancado por la nacia vespero, Harmonio en Prospera Epoko estas prezentadoj de akrobataĵoj kaj La Iamo Longe for por la Internacia Vespero. Li memoras:

“Por pli nuanci la scenon de esperantaj aranĝoj, mi cerbumis pri ĉiuj detaloj de la programoj, de la tekstoj sur la programoj ĝis la scenejaj lumoj. La versoj sur la belaj programoj elĉerpis nian pripensadon.”

Feliĉe apud li estas Alessandra Madella, instruistino



dungita el Italio, kaj Wang Minhao, veterana kaj sperta Esperantisto el Ŝanhaĵo. Ili trioje fojfoje maĉis la ritmojn kaj rimojn de la versoj ĝis vere komprenitaj.

Rimarkinde estas, ke inter la kvar vesperoj estis prezentado de akrobato, des pli en la akrobata prezentado varie nuanca la elementoj de lokaj folkloroj tiel ke ĝi distingiĝas de la kutima akrobatado. Graciaj etnaj dancmovetoj reliefigas la ekstreme komplikajn kaj malfacilajn akrobataĵojn. La tuta prezentado estas surprize kaj harmonie belega. Oni rimarkis ankaŭ, ke inter la aktoroj estas tre junaj geknaboj. Duan rakontis la historieton de la varbo,

“Antaŭ du jaroj, ni akceptis la akrobatan grupon, kiu malfacile vivtenis sin en simpla turneo. Ĝi estis Yunnan-a Akrobata Ensemblo disvolviĝinta el kvarmembra akrobata familio. Por la tre junaj aktoroj, kies eduko estas nepra, mi postulas, ke ili plenumu la devigan edukon en elementa lernejo, kaj mia kolegio pagas por ili la lernokoston. Ĉar sen kultura eduko, ili ne povos aktualigi la altnivelan prezentadon.”

Dum la intervjuo, sinjoro Duan kondukis nin al unu el la ekzerchaloj, kie gestudentoj de la fakultato pri aktorado ekzercis sin per nova kantdanca dramo “Kvarorela Harmonio”. Yunnan estas hejmloko de ĉina fama muzikisto Nie'er (聂耳). Tiu nomo enhavas kvar ideogramojn “er” (耳), kiu signifas orejon. Estas muzika frandaĵo el la etno Hanio. En la dramo ensemblos bambutamburado, bambuflutado kaj diversaj bambuaj instrumentoj kun polifonia kantado.

Ni estis jam ebriaj el la vido de la streĉita ekzercado.

Duan diris, ke la dramon oni streĉforte preparas por la arta festivalo de la provinco okazonta en aŭgusto, kaj ĝi estas programo konsiderita kiel repertuaro de la etno Hanio. Duan malkaŝis:

“Nun ni jam proponis la peticion, ke la polifonia kantado de Hani-etno estu la monda kultura heredaĵo. Krome ni estas faranta videan programon ‘Muzika Yunnan’ kadre de la projekto de nacia administracio pri eldonado. La videa programo prezentos la muzikaĵojn de 25 etnoj vivantaj en Yunnan. Ni prilaboros plej bonajn verkojn por pavi kolorriĉajn naciminoritatajn kulturojn de Ĉinio.”

Duan Yongxing esperantistiĝis en la komenco de la 1980-aj jaroj. En la jaro 1985, li iniciatis okazigon de la Unua Ĉina Tutlanda Kongreso de Esperanto. Nun post tridek jaroj, sukcese okupiĝante pri arta eduko li refoje venigis landan kongreson nome la 11-an, paralele kun la 67-a Kongreso de IFEF. Denove li sukcesis. Li estis premiita de la Ĉina Esperanto-Ligo per “aparta kontribuo” en la ĉifoja kongreso. Parolante pri la travivaĵo kiel Esperantisto, li mienis tre fiere.

Malfermiĝis novaj fervojlinioj tra Azio kaj Eŭropo

看郑新欧班列如何加速中欧物流贸易 跨境班列回程揽货难问题仍亟待解决

Xiong Linping

Oktobron kaj novembron de 2014 sinsekve malfermiĝis fervojlinioj por "Ekspreso Hunan-Eŭropo" kaj "Ekspreso Yiwu-Eŭropo" tra la azia kaj eŭropa kontinentoj. Kun ilia funkciado nun en Ĉinio jam troviĝas ok fervojlinioj, per kiuj interligiĝas varaj transportado kaj komercado inter Azio kaj Eŭropo. La "Ekspreso Zhengzhou-Eŭropo" veturas inter Zhengzhou, la urbo de la centra regiono de Ĉinio kaj Hamburgo, Germanio.

Laŭ statistiko de la Ĉina Fervoja Korporacio, ĝis la 26a de novembro 2014 sume jam estis 257 trajnoj veturantaj de diversaj lokoj de Ĉinio al Eŭropo, dum la trajnoj kurantaj de Zhengzhou al Hamburgo jam atingis kvaronon de la tuto.

Respondeculo de la kompanio Hewlett-Packard (HP), kiel kliento de la fervojo Ĉinio-Eŭropo, opinias, ke kompare kun mara transporto la fervoja pli rapidas, kaj kompare kun aera transporto ĝi malpli kostas.

"Plej granda bono, kiun alportas al ni la fervojo, estas ŝpari tempon de transportado. Se ni uzus tradicion maran transportadon, ni bezonus ĉirkaŭ 36 tagojn. Sed nun ni prenas fervojan transportadon, jam sufiĉas nur 22 tagoj. Nu, ni ŝparas 14 tagojn, kaj tio signifas, ke ni ŝparas koston de dusemajna stokado. Tio estas tre grava, precipe por niaj produktoj alte kromvaloraj."

Liu Jun (刘 俊), respondeculo de transporta fako de germana fervoja kompanio, opinias, ke mallongigi la tempon de stokado signifas malaltigi koston, kaj por klientoj kiel ĉinaj tiel ankaŭ eŭropaj tio signifas, ke la varoj iĝas "malpli kostaj". "Tia fervojo multe reduktas transportan tempon, kaj por var-posedantoj ĉu ĉinaj ĉu eŭropaj tio signifas malaltigi koston kaj de kapitalo kaj de stokado. Do la fervojo estas tre taŭga kaj oportuna."

Sed, kvankam ne mankas varoj el diversaj lokoj en Ĉinio

kaj, kiam trajnoj veturas al eŭropo, kutime ili portas kun si plenajn varojn, tamen, kiam ili revenas, ofte kun malplenaj vagonoj. Do, pro tio, multaj trajnoj laboras senprofite. Jen tikla problemo. Ni prenas "Ekspreson Zheng-Eŭropo" kiel ekzemplon: ĝis la 10a de decembro 2014 ĝi havis 69 trajnojn alirantaj al Eŭropo, sed kiam ili revenis, krom ses, ĉiuj kun vakuaj vagonoj. Kiom granda diferenco inter aliro kaj reveno! Kiel solvi la problemon? Shi Fenghua, vicdirektoro de la fervoja kontenera centro de Zhengzhou, diris, ke oni devas instali pli da filioj ekzemple en Varsovio, Hamburgo kaj aliaj lokoj en Eŭropo, kaj fari pli grandan penon, ke pli da varoj, ekzemple da aŭtoj kaj aliaj produktoj, estu transportataj en reveno.

La 18an de novembro 2014, du ĉiaterenaj aŭtoj Land Rover el Germanio per trajno de "Ekspreso Zhengzhou-Eŭropo" atingis la urbon Zhengzhou. Ili estas la unuaj importitaj aŭtoj pere de fervojo tra Azio kaj Eŭropo. Laŭ sinjorino Yuan, reprezentanto de entrepreno importinta tiujn ĉi aŭtojn, ŝi kaj ŝia eŭropa kliento, konsiderinte kelkajn eblojn, finfine decidis uzi azi-eŭropan fervojon por transporti la aŭtojn.

"Estas kaŭzo alia krom tempo, ĉar en komparo kun mara transportado la fervoja certe estas pli rapida. Sekve niaj importitaj aŭtoj estas malpli kostaj ol en alia transporta maniero."

Kun iompostioma plenumiĝo de la strategioj "ekonomia zono por silka vojo" kaj "mara silka vojo por la 21a jarcento" la du grandaj terblokoj, Azio kaj Eŭropo, nepre pli intense kontaktiĝas inter si en ekonomio. Laŭ Sun Yongfu (孙永福), direktoro de la sekcio pri Eŭropo sub la ĉina Komerca Ministerio, kunlaboro pri ekonomio kaj komerco inter Ĉinio kaj Meza kaj Orienta Euro po renkontos grandan bonŝancon por disvolviĝo, kaj malfermi tiujn fervojliniojn havas tre gravan signifon.

Transmara firmaokunigo rolas grave en transformiĝo kaj pligradigo

海外并购助力鞍山企业转型升级

Xiong Linping

La malnova industribazo en la nordorienta parto de Ĉinio, iam kun ĉasado de “kreskokvanto” kiel ĉefaĵo, nun spertas la periodon de “kvalaltigo”, transformiĝante kaj altrangiĝante. Tamen multaj tradiciaj entreprenoj, pro manko de pinta teknologio, ne povis tuj disrompi la botelkolon de evoluado. En la lastaj jaroj iuj el tiuj nordorientaj entreprenoj, instigite de la loka registaro, sukcesis enkonduki pintan teknologion per transmara firmaokunigo, kaj la transformiĝo kaj altrangiĝo efektiviĝis danke al modelo de kungajno kaj kunprofito. En la urbo Anshan de la provinco Liaoning nordoriente en Ĉinio jam plenumiĝis dekoj da programoj de transmara firmaokunigo. Antaŭ nelonge raportisto vizitis ĉi tie kelkajn entreprenojn kaj sentis en tiu malnova industriurbo la ĝojindan ŝanĝiĝon alportitan de teknologia kunigado.

La akcia kompanio Taigong por inĝenieria mekaniko en Anshan fondiĝis en la jaro 1996. Ĝi estas ne malpli granda entrepreno okupiĝanta ĉefe pri naftaj mekanikaĵoj, buldozoj, ŝarĝoveturiloj kaj iliaj partoj. Post pli ol dek jaroj da funkciigado laŭ tradicia evolumodelo, la nuna direktoro Tang Hao iom post iom konsciis, ke la tekniko fabriki dentradojn iĝis katenado por evoluo de la entrepreno. En 2010 lia entrepreno komencis kovadon pri transmara firmaokunigo, kun la celo pritrakti la teknikan botelkolon. En 2013 Taigong aĉetis 70-procentan akcion de la usona kompanio R. P. Machine Enterprises kontraŭ 20 milionoj da usonaj dolaroj, kaj el tio fondiĝis la kompanio Higher, ĉefe mastrata de ĉina flanko.

Tang Hao diris, ke tiu ĉi kunfandiĝo signifas, ke Taigong akiris la pintan teknologion kaj produktan ekipaĵon de la kompanio R. P. Machine Enterprises, kaj ke ĝi ekhavis kapablon fabriki pintajn programregatajn ilmaŝinojn dentradajn kaj produkti kaj vendi rapidŝanĝilojn alte kvalitajn por aŭtomobilo kaj aŭtajn dentradajn partojn.

“Ni iris al Usono por aneksi firmaon, el kio tamen la plej granda ricevo estis en tio, ke ni prenis la ideon el la anekso, kiel fari esploradon kaj fabrikadon. Tiu ĉi ricevitaĵo reprezentas la pinton de ĉi-flanka teknologio, kiun mi povas kontakti. Tio signifas, ke en proksima estonteco ni povos enkonduki la kompletan da teknologioj en nian landon, kaj per tio nia firmao ekfamigos sin, ĉar en nia lando oni ankoraŭ ne povas produkti tiujn objektojn,” diris Tang Hao.

Laŭinforme, danke al tiu kunfando la kompanio R. P. Machine Enterprises havis frapantan altiĝon de jara enspezo, kaj samtempe sukcesis eksporti siajn produktaĵojn en la merkato de Ĉinio. Tang Hao opiniis, ke kunprofito kaj kungajno estas gravaj elementoj de transmara kunigado:

“Kial la kompanio R. P. Machine Enterprises elektis min kiel partneron? Unue, ĝi traktis Ĉinion kiel bonan merkaton; due, ĝi opiniis, ke mia aliĝo povos alporti al ĝi novan komercan ŝancon.”

Tang Hao diris al raportisto, ke en la tuta procezo de kunigado la loka registaro donis tre fortan helpon. Laŭ konigo, por certigi transmaran firmaokunigon, pluraj sekcioj de la loka registaro helpeme rekomendis agentejojn al entreprenoj por serci firmaojn, kiuj volis esti kunfanditaj, plenigi mankon de monrimedoj, kaj tiel plu.

Forta subtenado de la registaro, iniciativa koncepto pri evoluigo, praktike kunlabora spirito, ĉio igis en lastaj jaroj la transmaran firmaokunigon de Anshanaj entreprenoj profitigaj kaj imponaj. Nun, multaj entreprenoj jam trapasis la intererodiĝan periodon de la kunfandiĝo, kaj komencis emani potencon dinamikon de kreskado.

La impulsoj estas malfacile priskribeblaj, sed gravas mem-esprimo

Intervjuo kun Amiao-sendependa dokument-filmisto

Alessandra Maedella

En nia serĉado de filmistoj de la Yunnan-a regiono en sud-okcidenta Ĉinio, ni ofte trovis aĝ-dividon pro kiu iom pli maljunaj filmistoj ne rigardas tiel favore la filmkapablon de junuloj sub tridek jaroj. Pro tio, ni pensis ke serioza esplorado de la filmsceno de Yunnan ne povas esti kompleta sen intervjuo al juna filmisto en siaj 20 jaroj, kiu povas montri al ni la interesojn kaj la pensmanieron de la nova generacio de dokumentistoj. Amiao estas instruisto de la Profesia Artkolegio de Kunming, kaj liaj dokumentaj filmoj estas alte taksataj de siaj kolegoj.

Amiao naskiĝis en vilaĝo en Hunan-provinco kaj estas hanetna. Dum studado en mezlernejo li interesiĝis pri fotado. Post sia ekzameno por eniri en universitaton, li volis studi fotadon kaj kinematografion. Tamen tiutempe malmultaj universitatoj ofertis tiun ĉi fakon. La Profesia Artkolegio de Kunming proponis stud-itinieron pri fotado kiu inkludis kinon je la fino. Post la diplomiĝo, li laboris kiel fotisto kaj filmisto por iu kompanio. Sed fine li revenis al la kolegio kiel instruisto de enreta munta softvaro, kiel ekzemple Adobe Premiere. Li ankaŭ partoprenas en la produktado de reklamoj kaj dokumentaj filmoj por la studio konektita kun la lernejo. Unu el ĝiaj plej gravaj projektoj estas “Voĉoj de Yunnan.” Kiam mi estis studento, mi havis pli da libera tempo por fari mallongajn filmojn laŭ mia plaĉo. Sed eĉ nun mi daŭrigas kun mia propra sendependa laboro.

Ĉiuj liaj studentoj kaj kolegoj taksas lian filmadon kiel tre originalan. Pri tio Amiao mem opinias :

“Mi estas evoluiginta mian nunan dokumentan filmon dum tri jaroj, kaj tiu laborado daŭras ankoraŭ. Mi

maturiĝis kiel artisto kaj persono, kaj mia pensmaniero subtile ŝanĝiĝis. Mia filmo reflektas tiun ĉi kreskon. Fragmentoj kiel la reprezento de la funeralo de virino el mia familio, aŭ tio de infanoj rigardantaj pornon en mia vilaĝo naskiĝis kiel tute nerilataj mallongaĵ filmoj. Kaj nun ili estas partoj de la sama filmo.”

La laboro por kunigi ilin estas elĉerpa. Komence ĝi ne devus esti tiel komplika. Li estis nur montranta iujn gravajn spertojn kiuj profunde ekscitis siajn emociojn aŭ montris iujn konfliktojn. Tiuj impulsoj ne estis pozitivaj aŭ negativaj, sed ili venis de homoj kiujn li vidis kaj de emociigaj detaloj pri ili. Ili estis spontaneaj kaj ne reflektaj, kaj ili ofte rilatis al sekso kiel fundamenta forto. En antaŭa versio de via filmo estis tre impresa sekvenco en kiuj li unue montris la nudan korpon de mortinta virino lavata de aliaj virinoj de via familio, kaj tuj poste li fermas la fenestron kontraŭ la kamerao kiu altrudas sin sur via intimeco. Ĉu ĉi tiu sekvenco daŭre estas en lia filmo? Raportistino ĵetis la demandon, kaj Amiao respondis:

“Jes, ĝi restas ankoraŭ en la filmo. Mi ne pensis pri tiu kombino kiam mi estis filmanta. Mi celis kapti kelkajn detalojn kaj respondi al forta emocio. Mi sekvis mian internan senson por kunligi ĉi tiujn scenojn, sen tute kompreni kion tiu ligo signifis. Nun mi vidas ke kelkaj koheraj temoj estas naskiĝantaj el tiu serio de originalaj impulsoj. Mi sentas ke ili povas esti reorganizataj en filmo, sed ili estas ankoraŭ iom malklaraj. Mia tasko kiel artisto estas senkompate esplori min mem en tiu konfuzo, por eltrovi la signifon de tiuj impulsoj. Nun mi ne ankoraŭ pretas alfronti la grandajn demandojn pri kiuj ĉiu parolas, kiel la ŝanĝiĝantan vilaĝan vivon aŭ eĉ

socialismon. Mi vidas impulsojn kiel fortaj momentoj kiujn mi volas esplori, sen fali en malprofundajn aŭ modajn klarigojn kiuj malhelpas mian personan serĉon de veraj signifoj.”

“La procezo estas tortura,” diris Amiao parolante pri la esplorprocezo de tiaj impulsoj. Ĉar ĝi ne estas nur pozitiva aŭ negativa. Finfine, impulsoj ne povas esti komprenataj ekstere de ilia rilato kun la ĉiutaga vivo. Li diris, ke li ŝatas la feminisman ideon doni valoron al agoj de ĉiutaga vivo, kiel ekzemple kuirado. Sed ili pliigos vian valoron nur se vi jam havas iun kapablecon kaj senson de mem-valoro. Ĉiutaga vivo kutime nur antaŭeniras, kaj premas vin sub ĝia amaso da respondecoj, kiel gajni vivon, geedziĝi, havi filojn. Tamen je iuj punktoj kaj momentoj estas eksplodoj, ofte de seksa naturo sed ne nur. Temas pri la impulsoj. Sed ili grandparte estas nur iluzioj de ni mem fabrikataj. Apenaŭ ni revenas la nia kutima rutino, la ĉiutaga vivo venkas kaj entombigas tiujn originalajn impulsojn. Tial, li ne volas simple registri ĉiutagan vivon en sia filmo, sed serĉi iun “pli veran” ĉiutagan vivon kiu inkludas la konstitutivan konflikton kun niaj impulsoj.

Do kiel li priskribus ĉi tiun batalon inter impulsoj kaj ĉiutaga vivo? Amiao konigis:

“Ĝi estas malfacile priskribebla. Mia kreaĵo celas ekvilibrigi miajn sentojn inter impulsoj kaj ĉiutaga vivo. La kontraŭdiro ‘aperas’ kaj ‘malaperas’ en la procezo de muntado. Ĝi komenciĝas per impulso kiu kaptis mian senton dum filmado. Kaj ĝi finas denove kun ĉiutaga vivo, kiun tamen kaj la artisto kaj la publiko povas nun pripensi pli racie. La procezo de kreado estas malfacila,

ĉar ĝi peras inter tiuj du partoj, kiuj same gravas. Vi devas stari en la mezo. Arto purigas nin de troigaj sentoj, por akceptigi de ni pli bone la ĉiutagan vivon. Oni povas kompari tion kun subita impulso iri al necesejo. Poste, vi povas labori libere.”

Ŝajnas, ke li havas karakteran koncepton pri arto, kiel Aristotelo kiu pensis ke arto purigas la publikon de ekcesaj pasioj. Li vidas komunecon de celo inter li mem kaj la publiko. Li daŭre klarigis, kiam li estis pli juna, li kutimis pensi ke li devos elekti inter esti fidela al siaj propraj ideoj aŭ elvendi al la spektantaro. Nun li opinias pli kaj pli ke komuneco estas ebla, pro tio ke ĉiuj sentas la samajn emociojn kaj impulsojn. Ankaŭ sentoj de beleco kaj malbeleco eblas komunikeblaj, malgraŭ kulturaj diferencoj. Li esperas ke komuneco estos atingebla, ĉar ĝi estas esenca por artisto. Sed li ne povas priskribi sian idealan publikon.

Al la fina demando de raportistinoj je tio, ĉu vi konsideras vin mem sendependa filmisto? Amiao respondis:

“Kiam mia laboro estos finita, aliaj donos difinon. Mi verdire ne konas multajn sendependajn filmistojn kaj iliajn verkojn. Mia tasko estas simple registri tion kio kortuŝas min kaj pensi kiel organizi ĝin. Mem-esprimo estas grava, sed mi plejparte volas kapti homojn en ilia medio. Sed mi ne povas paroli pri tiu aspekto, ĉar ĝi implicus diskonigi privatajn personojn kaj miajn plej fortajn memorojn pri ili.”



Fervojo kvazaŭbusa en la delto de Jangzio

长三角铁路实现公交化一小时城市生活圈解决高房租、异地恋等生活难题

Xiong Linping

Antaŭ nelonge la ĉina fervojo refoje renovigis sian veturmapon: trajnoj de grandrapida fervojo penetris de la evoluinta delto de Jangzio en la relative hermetikan okcidenton de la provinco Hunan. Kun la sama distanco, la tempo tamen estas reduktita je preskaŭ du trionoj. Kelkaj novaj fervojoj estas sinsekve komencitaj al operacioj, kio ne nur havigis al la delto de Yangzio grandrapide fervojajn arteriojn, sed ankaŭ formas la reton de trakaj vejnoj ĉe la delto, t.e. la plej potenca urbgrupo en Ĉinio se rilate al ĝenerala povo. Kaj la operacia maniero de la kvazaŭbusa fervojo igas ne malmultajn laborantojn, kiuj laboras en la financa centro Ŝanhajo dum loĝas en ĉirkaŭa urbo, havi tian vivon: ili prenas "trajno-taksion", kvazaŭ ili vivus en sama urbo. La novstila trafika reto inter urboj ŝanĝis ne sole distancon de spaco, sed krome vivmanieron de homoj.

Lastatempe nia raportisto Gu Yingyang persone spertis la urban vivsferon ene de unu horo, celante intervjuadon. Li raportas al ni, kiel trajnoj solvas tiklajn problemojn, i.a. pri alta domlua prezo kaj amrilato longdistanca.

Fraŭlino Jiang laboras en fremdlanda entrepreno en

Ŝanhajo, sed loĝas en la urbo Suzhou. Inter la du lokoj kuŝas distanco de ĉ. 100 kilometroj. De tiam, kiam antaŭ 4 jaroj ekfunkciis grandrapida fervojo interurba, fraŭlino Jiang ĉiutage ir-reiras inter la du urboj. Ŝi ŝerce nomas tion "vivo en sama urbo".

"Ĉi tie la trajno startas je la 7a kaj 23 minutoj, kaj tien en Suzhou ĝi jam atingas apenaŭ je la oka. Estas vere oportune. Mi veturas inter Suzhou kaj Ŝanhajo, do mi ne luas domon en Ŝanhajo."

Antaŭe, kiam grandrapida fervojo ankoraŭ ne malfermiĝis, Jiang luis apartamenton kun nur unu ĉambro, kaj tiam la ĉambra luprezo, inkluzive la prezon de akvo, elektro kaj aliaj, kostis ĉ. 2 500 juanojn. Kaj nun ŝi kalkulas:

"Por veturi de Ŝanhajo al Suzhou, la sola veturo kostas 40 juanojn, kaj plus reveturo, jen 80 juanojn en ĉiu tago. La trajna pago kaj la aldonaj prezoj de metroo kaj taksio en Suzhou estas 100 juanoj kune. La elspezo do egalas preskaŭ al tiu de la ĉambroluo."

Mondo, pli bela ol vi supozas rakonto pri vojaĝo de emeritaj geedzoj

世界，比你想象中美好 —— 六旬退休夫妇环球游

Selena

Kio estas via plej granda revo en la vivo? En Ĉinio plejpartaj homoj tiel respondis: estas vojaĝo tra la mondo. Preskaŭ ĉiuj deziras vojaĝi al pli multe da lokoj por vidi la mondon. Liu Zhiming kaj lia edzino Cai Songmei estas paro el tiuj homoj. Ili vojaĝis al 51 landoj kaj regionoj en Eŭropo, Azio, Afriko kaj Ameriko, inkluzive de Ora Triangulo, Palestino kaj Israelo, plej malriĉa lando Haitio ktp.

La edzino Cai estas fano al geografio. Kiam ŝi estis juna, ŝi interesiĝis pri mapo. En la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento hazarde ili spektis dokumentan filmon Vojaĝo tra la Mondo dum 80 Tagoj, kaj tiam venis al ili koncepto pri tia vojaĝmaniero.

“80 tagoj estas sufiĉaj por vojaĝi tra la tuta mondo! Tio min surprizis.” La edzino Cai tiel taksis.

Antaŭ ilia emeritiĝo, Liu kaj Cai iris al plejpartaj lokoj de Ĉinio utiligante feriajn tagojn kaj oficaĵn vojaĝojn, kaj tial ili havis multajn spertojn pri vojaĝo. Depost kiam ili sin liberigis de la laboro, ili vere havis bonŝancon por eliri kaj vidi la mondon. Estante policianoj dum la tuta vivo, ili posedas pli da kuraĝo kaj firmeco ol plejpartaj vojaĝantoj. Ili elektis la lokon Ora Triangulo kiel la unuan cellokon de la vojaĝo, kiu estas rigardata kiel danĝera kaj terura loko. Liu diris:

“Kompreneble mi havas mensan necertecon kaj ne scias kio okazus en tiu loko. Tamen forta scivoleco kaj explorema spirito kuraĝigas nin iri tien. Antaŭ grimpo sur la monto ekzistas pensoj maltrankviligantaj.”

“Ĉu ni havus sufiĉajn manĝaĵojn kaj sekuran loĝejon? Ĉu ni renkontus rabistojn aŭ batalistojn? Ĉio estas nebula.”

Spite imagitan danĝeron ili antaŭeniris kun granda singardo kaj atingis la vilaĝon Mae Salong en Tajlando je la altitudo de 1 100 metroj. Estis entute ekster ilia imago, ke la vilaĝo aperas antaŭ ili kvieta kaj pejzaĝa.

“Ni renkontis someran Akvoverŝan Feston kaj ĉiuj ĝojis pro la festo. Oni montris gastamon kaj verŝis akvon sur nin. Ankaŭ ni nin banis en la lokaj moroj.”

Ili ĝuis ekzotajn pejzaĝojn, belan arkitekturon kaj lokan kuiradon. Ili havis multajn belajn momentojn kaj ankaŭ renkontis malfacilaĵojn. Iasence tio estas ilia esploro al la mondo.

Liu diris al ni, ke sur la vojo ili ĉiam sentis varmon de lokanoj, kiuj fervore montris sian gastamon al ili. “Komence ĉio por ni estas nekonata, sed tagoposttage ilia gastamo sentigis nin pri ilia varmo kaj afableco. Ili donis al ni rideton, kaj ni ridetas al ili.” Tio probable estas signifo de la vojaĝo: oni eble ne povas vojaĝi tra la tuta mondo, tamen la sperto akirita dum la vojaĝo kun la kortuŝo alportita de lokanoj estas la plej valora trezoro.

Vendejo de nuptaj kostumoj kiel antikvaj

左手轻云蔽月，右手风华流年——开一家古装嫁衣店

Xiong Linping



Antikvaj kostumoj povas bildigi gracion kaj belon de virinoj, kaj ankaŭ romantikan etoson, kiu donis al viroj pli grandan inklinon ĉasi sian korulinon. Virinoj en antikva kostumo ĉiam aspektas teneraj kaj ĉarmaj, dum viroj, dignaj kaj ĝentilaj. Kun la reviviĝo de antikva kulturo, furoro de antikvaj kostumoj en telefilmoj, kaj ŝanĝiĝo de koncepto pri belo, pli kaj pli multaj homoj en Ĉinio komencas havi inklinon al antikvaj kostumoj.

Fraŭlino Chen Yan (陈燕) estas mastrino de vendejo por nuptaj kostumoj kiel antikvaj. Ŝi naskiĝis en la 80aj jaroj de la 20a jarcento, tamen tre admiras antikvajn kostumojn, precipe nuptajn.

En la jaro 2008 Chen Yan, baldaŭ elironta el universitato, ne provis serĉi stabilan laboron, kiel la gepatroj volis, sed preferis esti komercistino por antikvaj nuptaj vestoj.

Ĉar ŝi rimarkis, ke pli kaj pli multaj gejunuloj emas porti antikvajn vestojn, kiam ili geedziĝas. Ili opinias, ke antikvaj ceremoniaj kostumoj pli konformas al la ĉina tradicia moro kaj ankaŭ al la tendenco de modernaj gejunuloj.

Antaŭ sia eliro el universitato Chen Yan iris al Keqiao, Zhejiang. En la urbeto estas la plej granda merkato pri ŝtofo en Ĉinio. Kiam ŝi vidis tiom abundaj ŝtofoj, ŝi estis ĝojsurprizita. Ŝi pensis, ekzemple, kian veston oni povus fari el tiu ŝtofo. Kvankvam ŝi en universitato studis pri administrado, tamen en ŝia kapo ofte venis ideo pri kostuma desegnado. Kaj nun antaŭ ŝi troviĝis diversspecaj ŝtofoj, kiuj multe kuraĝigis ŝin al ŝia interesiĝo, tio estis, teni vendejon por antikvaj kostumoj. Tial ŝi havis sian vestovendejon. Tio ne estis facila afero por juna knabino, ĉar ŝi estis ĵus diplomiĝinta el universitato kaj ne havis sperton pri komercado de vestoj. Sed estis feliĉe, ke tiam estis nur kelkaj vendejoj por antikvaj nuptaj kostumoj en la tuta lando. Kaj cetere, en ŝia vendejo sin trovis sortimento da kostumoj relative pli multaj. Sekve de tio, multaj novaj kaj malnovaj klientoj venis al la vendejo.

Nuntempe la vestovendejo de Chan Yan iras prospere, kaj ŝia vivo ankaŭ marŝas pli bone.

Nun ŝi havas sian teamon, kiu konsistas el ĉirkaŭ tridek personoj. Ŝi esperas, ke la teamo povos esti pli forta kaj pli granda. En nuna tempo la antikvaj kostumoj de ŝia vendejo pli kaj pli furoras, kaj pli kaj pli multaj homoj ŝatas antikvajn kostumojn. Tio, kio allogas klientojn, estas io tradicia. Ili opinias, ke ili estas ĉinoj, kaj en grava okazo tia kia nupto, sin vesti en ĉineska kostumo estas pli dece kaj ankaŭ pli belaspekte.

Nacia kostumo estas simbolo de nacio. Chan Yan deziras, ke pli multaj homoj ŝatas siajn naciajn kostumojn.